Organe de l'Union des travailleurs espérantistes de langue française

www.sat-amikaro.org

Zone euro : 3, 50 €
Autres pays : 4, 50 €

# La SAGO

## La Sat-Amikara GazetO

*Espéranto : vers une culture sociale sans frontières.*

Bi-mestriel
114
Mars-Avril 2017

# Kies ero estas tio ?

***El la multaj vidindaĵoj ĉirkaŭ la kongres-loko, trovu paĝon 15 al kiu rilatas ĉi tiu stranga peco bedaŭrinde nur nečipe videbla...***

***Sed ja pli popole, vi kulturiĝos SAT-Amikarece (t.e. sen limoj - eĉ mona) al sursceneja kulturaĵo - vidu paĝon 2 !***

SAT-Amikaro 69a kongreso
San-Sebastiano-če-Luaro
15a-18a aprilo 2017

SAT-Amikara kongreso en San-Sebastiano-ĉe-Luaro (Saint-Sébastien-sur-Loire)

# Sabata kultur-vespero (15an de Aprilo) kun la Miĵoretoj*

## La Miĵoretoj : la reago de l' bastono !

Kiel diris *Louis Aragon,* «La estonteco de l' viro 'stas la virino».
Pli ol iam aktuala, la virina temo ĉefiĝas en nia socio.
Laŭ la loko kiun ŝi ricevas aŭ kiun ŝi donas al si, virino havas apartajn parolon kaj liberecon.
La Miĵoretoj decidis honorigi la virinon, en ŝia plena komplekseco kaj ŝia splendeco, substreki kion ŝi pensas kaj sentas sen la konveneca filtrilo, kun flanko malloga kaj alloga.
El la naivulino ĝis la kuraĝulino, tra la malkatenigitulino, la Miĵoretoj enigas la publikon en sian ekstravagancan universon.
Noblaj, ridegigaj kaj engaĝitaj.... la Miĵoretoj ...
Frandendaj ĉe l' pavimo !

P*

## Les Mijorettes : le retour de bâton !

Comme le disait Louis Aragon, «l'avenir de l'homme est la femme». Plus que jamais d'actualité, la question de la femme est centrale dans notre société.
Suivant la place qui lui est dévolue ou qu'elle s'attribue, la femme a une parole et une liberté qui lui sont propres.
Les Mijorettes ont décidé d'honorer la femme dans toute sa complexité et sa splendeur, de souligner ce que celle-ci pense et ressent sans le filtre de la bienséance, avec un côté trash et sexy.
De la femme naïve à la femme courageuse, en passant par la femme libérée, les Mijorettes embarquent le public dans leur univers déjanté.
Généreuses, désopilantes et engagées...
Les Mijorettes...
A savourer sur le pavé !

* Vortludo inter «Majorette» (Maĵoreto = paradistino) kaj «mijaurée» (tie, «chipie» = arogantulino)

# SAT kongresos en Gimpo, apud Seulo, en 2017

Post kongresoj en Kanado (Toronto, 1973) kaj en Brazilo (Campos do Jordao, 1988), SAT por la tria fojo kongresos ekster Eŭropo, ĉi-foje en Azio. De multaj jardekoj, Japanio estis la azia lando, kie estas plej multaj SAT-anoj. Sed de iom pli ol jardeko formiĝis ankaŭ kerno de aktivuloj en Koreio, kiu firmiĝis per interŝanĝoj interalie kun la japanaj najbaroj. Ili konsistigis la Organizan Kongres-Komitaton, kiu invitis la 90an SAT-Kongreson en Gimpo, apud Seulo, inter la 29a de julio kaj la 5a de aŭgusto 2017. Signifoplene, inter la OKK-anoj, unu el la vic-prezidantoj estas aktivulo el la japana insulo Hokkajdo.

Kun tia OKK ne eblas dubi, ke la programo estos ege interesa el socipolitika vidpunkto. Ekzemple, jam estas anoncita ekskurso al insulo Ganghwa, loĝata ekde antikveco, kiu fariĝis rifuĝejo por la registaro dum mongola invado inter la 13a kaj 17a jarcento. Ĝi ankaŭ estis la ĉefa kontaktpunkto kun imperiismaj intervenoj de Francio, Usono kaj Japanio en la 19a jarcento. Krome, de kelkaj monatoj okazas ampleksa socia movado pro diversaj koruptaj skandaloj, kiuj interalie provokis forigon de la prezidantino, kiu plu devas esti leĝe konfirmita. La SAT-anoj en Koreio partoprenis en tiuj manifestacioj kaj certe povos mem rakonti pri la nuna situacio.

Ankaŭ la arta flanko estos bone flegata, kun prezento de folkloraj dancoj, kaj lernorondo pri mandala medita desegnado. Anoncitaj estas prelegoj pri Fukuŝimo, veganismo kaj stilfiguroj en korea literaturo.

El praktika vidpunkto, eĉ se la flugkostoj estos altaj por loĝantoj de Eŭropo, indas atentigi, ke la surlokaj restad-kostoj estos relative favorprezaj. Unuopa tranokto en la kongresa hotelo kostos 20 eŭrojn, inkluzive de matenmanĝo, kaj unuopa tag- aŭ vespermanĝo kostos 7 eŭrojn.

Jam aliĝis 26 homoj el 8 landoj kaj 3 kontinentoj. Aliĝilo kaj pliaj informoj estas troveblaj ĉe la kongresa retpaĝo: http://sat90.org/

**Vinko Markovo, laŭ informoj de la OKK**

P

# Esperu ni !

Vi ricevas ĉi tiun numeron kelkajn semajnojn antaŭ la kongreso de SAT-Amikaro.

Ni dankas ĉiujn kiuj jam aliĝis kaj kalkulas kun aliaj anoj por partopreni en tiu asocia renkontiĝo organizata de efika grupo en nanta regiono. Post la antaŭa kongreso en Metabief en 2013, ni despli ĝojas ke loka skipo akceptos nin en grava kongreso ; ili pretas helpi skipon, kiu proponos organizi kongreson en 2018 !

Ni ĝuos apartan etoson en St Sebastien s/Loire, spektakla, turista en laboristaj pasintaj kaj nunaj ejoj. Ni interŝanĝos pri estonto de nia asocio por decidi nepran renovigon.

Se vi ne jam aliĝis al nia kongreso, nepre sendu vian aliĝilon al OKK : disponebla en la retejo de SAT-Amikaro aŭ kontaktu OKK-n : kaj aliĝilon sendu al :
Agnes LEFEVRE : 15 la Brosse Tenaud 44 310 St Philbert de Grand Lieu
Ret. : agnes.lefevre@orange.fr Tel. : 06 80 17 17 51
Jam en 2016, vi konstatis ke la redakta skipo de La SAGO sukcesis eldoni valoran revuon. Partoprenu en tiu revivigo de via revuo por plifortigi kaj apogi la skipon !

Alia bona novaĵo : fine de februaro, jam 150 membroj frue aliĝis al SAT-Amikaro por 2017 ; inter ili, 24 novuloj aŭ eks-membroj.

Ni ne individue realvokos vin : do tiuj, kiuj ne jam realiĝis, ne forgesu sendi sian aliĝilon ! Kaj parolu al viaj esperantistaj amikoj por konigi vian asocion kaj ties agadojn.

Per translokiĝo de nia librostoko en kelojn en la 13a distriko de Parizo, ni faciligis la laboron de bonvolemuloj, kiuj laboras en nia libroservo. La post-inundan renovigon de la sidejo ni konsideras kiel unuan paŝon en vorkoj por plibonigi labor- kaj kunven-kondiĉojn en niaj lokoj. Ni devas daŭrigi la renovigadon.

Necesas rebaki la retejon de SAT-Amikaro por allogi novulojn kaj konigi niajn agadojn. Ĉu kelkaj membroj kompetentas por labori en tiu rekonstruado ? Se ni ne trovos eblecon ene de nia membraro, ni pagos eksteran servon.

Kontaktu nin se vi deziras kontribui en tiu tasko !

Ni plurfoje petis kandidatojn por eniri la komitaton de SAT-Amikaro : nepras ke membroj sin proponu por ĝin renovigi printempe 2017 ; ĝis nun, nur Lucette Échappé kandidatiĝis.

Tute ne sufiĉos ; ni opinias ke interalie franciliaj membroj nepre devus eniri la komitaton pro pariza sidejo kaj libroservo. Per komputilaj iloj, nia komitato malmultekoste kunvenas kun anoj kiuj loĝas en malproksimaj lokoj.

Esperu ni pro tiuj diversaj agrablaj novaĵoj !

Esperu ni ke vi, membroj de SAT-Amikaro konkrete kontribuos en tiu pozitiva revigliga movado !

Esperu ni ke pluraj inter vi fortigos la jam listigitaj partoprenantojn en la kongreso en Saint-Sebastien-sur-Loire la 15an-17an de aprilo 2017 ! Ni ege antaŭĝojas denove renkonti vin kaj ni bondeziras apartan bonvenon al ĉiuj novuloj kaj al la ne-esperantistoj kiuj akompanos kelkajn kongresanojn.

**La komitato de SAT-Amikaro : Lucette kaj Guy**

# Enhavo


| | |
|---|---|
| **SAT-Amikaro** | |
| "Esperu ni !" de la komitato | 3 |
| Agad-raporto | 4 |
| Kontraporto | 5-7 |
| **SAT-Kongreso,** | 2 |
| **Ĉ. la SAT-Amikara kongreso** | |
| Kovrilpaĝo : Kies ero ? | 1 |
| La Miĵoretoj | 2 |
| La elefanto de Nanto | 15 |
| Nia felietono Misŝuoj (13) | 13-14 |
| **Ideoj / Rakontoj / Informoj** | |
| Danĝero super publika instruado | 12 |
| Problematiko de afrikanaj lernantoj | 6-7 |
| **Pedagogio** | |
| Kiel traduki idiotismoj | 11 |
| Slipoj | 9-10 |
| **Libro–servo** | 8 |
| **utilaj informoj** | 10 |
| **Recenzoj** | |
| Libro vivas pli longe... | 11 |
| **Humuraĵoj-distraĵoj** | |
| Selle-Humuraĵo | 4, 9 |
| Tra la fenestro | 9, 16 |
| Vegane kuku | 15 |
| Te/st/udo §4 | 16 |


## NIVELOJ

Ĉiuj artikoloj estas akompanataj de lingv-nivela simbolo :

K = Komencantoj
P = Progresantoj
S = Spertuloj

***kun asterisko*** se tradukata franclingven aŭ kun glosaro por lingvaj malfacilaĵoj.

K P S
K* P* S*


**LA SAGO.**
CPPAP n° 0322 G 86224. ISSN : 1763–1319.
SAT-Amikaro, **132/134 bd Vincent–Auriol 75013 Paris**
Directeur de la Publication : Serge Sire
Impr. sur papier recyclé par :
L'arbre aux papiers 72100 Le Mans
Dépot légal à parution.

***Ĉefredaktanto*** kaj ***enpaĝiganto :*** Serĝo Sir'.
***Kongresa korespondanto :*** Lucette Échappé
***Redakt– kaj korekt-skipo :*** Janine kaj Yannick Dumoulin, Lucette Échappé, Ĵak LePuil, Vito Markovo, Serĝo Sir'.
***Partoprenis en ĉi numero :*** Rolando Cuenot, Lucette Échappé (Lumeto), Veronik' Girard, P. Grolemund', W. Kossi, Izabel Lamirested', Guy Martin, Ĵak LePuil, Vinko Markovo, Vito Markovo, Jean Selle, Serĝo Sir'.


## Kontribuaĵoj *Contributions*

**Ĉiam bonvenaj ! Sendu ilin al la redakta korespondanto :**
***Toujours bienvenues ! A – faire parvenir au correspondant de rédaction :***

Reto : **lasago@free.fr**

■ Prefere per reto, **tekstoj** en RTF–, ODT-aŭ TXT–formo por ligitaj dosieroj, skribitaj prefere en Unikodo, **bildoj** en TIFF–, JPEG–, PCX- aŭ GIF–formo.
■ Eventuale sur papero, tekstoj ***prefere*** tajpitaj, sen forstreko nek surkorekto (erarojn eventualajn, oni indiku marĝene) Ne tajpitaj kontribuaĵoj publikigeblas nur se volontulas iu tajpanto.
■Artikoloj ricevitaj post la 20a de la paraj monatoj ne povas esperi aperigon en la tuj sekvonta numero.

■ *de préférence par internet,* ***textes*** *en format RTF , ODT ou TXT pour un document joint, et* **images** *en format TIFF, JPEG, PCX ou GIF.*
■ *éventuellement sur papier par poste, les textes devant impérativement être typographiés (machine ou imprimante) sans ratures ni surcharges pour un traitement au scanner (erreurs éventuelles notées en marge) Les articles manuscrits ne peuvent être publiés que si nous disposons de dactylos bénévoles.*
■*Les articles reçus après le 20 des mois pairs ne peuvent pas espérer être publiés dans le numéro immédiatement suivant.*

**Pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem.**
**Represo de artikoloj permesata kun indiko de la fonto**

# Tra la fenestro

Dzeka_ Januaro 2017
Saluton al ĉiuj !
Hodiaŭ mi estas nek Supervirino, nek Tarzanino, nek Ĝinino, hodaŭ mi estas «Ŝtrumpfgrumblulino» !
Jes ja, mi grumblas ! Kial ? Ĉar mi aŭdis, vidis, legis ke Parizo deziras iĝi olimpia urbo en 2024.
Ĉu vi povas imagi la miliardojn kiuj, ĉi okaze englutiĝos nur por vidi sportistojn konkuri, inter kiuj, kelkajn narkulotulojn ?
Oni diras : «Tio vigligos komercon kaj do kreos laboron.» Eble ankaŭ vi, leganto, diros al mi : «Mi ne komprenas, vi rakontis kiel vi ŝatas renkonti turistojn kaj paroli kun ili pri Esperanto. Ĉu tio ne etos bona okazo ?» «Jes» mi respondos, sed Parizo ankaŭ ĵus kandidatiĝis (ekde la 22a de novembro 2016) por havi Universalan Ekpozicion. (Temo : Partigenda kono, protektenda planedo). Ĉu tiu evento ne pli bone kongruas kun Esperanto ?
Tiam ĉiuj Esperantistoj povos ĉeesti, eĉ havi budojn kaj interŝanĝi kun la vojirantoj.
Parizo jam estis olimpika urbo en 1900 kaj en 1924, sufiĉas ! Ni povas lasi lokon al alia urbo (Neniu afrika urbo iam gastigis olimpiajn ludojn.)
Oni tedas nin per tiu kandidateco ; radioj, ĵurnaloj, reto parolas pri tio ; la emblemo projekciiĝis sur triumfarkon. (Kaj kio pri energiaj ŝparaĵoj ?)
Oni gurdas nin ke ĉiuj Francoj nepre volas la Olimpikojn en Parizo en 2024. Ĉu vere ? Ĉu iu demandis tion al ni ? Ĉiukaze neniu demandis tion al mi !
Konklude, ĉu vi volas kelkajn ciferajn kostojn ?
Provizora buĝeto por tiuj ludoj :
3,2 miliardoj da eŭroj por la funkciiga parto
3 miliardoj por infrastrukturoj
1,7 miliardo por la olimpia vilaĝo
Kiu pagos ? Certe ne la Internacia Olimpika Komitato, kiu nenion financas, sed la Pariza Urbo kaj la Ŝtato, t.e. (tio estas) vi kaj mi…kaj la organizantaj urboj ne certas rericevi siajn financajn investaĵojn.

**Ĝis, Dzeka**

K*

Lingva helpkadro p.9

**transsendis Izabel' Lamirested'.**




*Testudo = tortue / Test-studo = étude par tests.
* Pederasto = pédophile. (homosexuel = samseksemulo)